

Orgaan
van de Bond van
Arbeiders-
Esperantisten FLE

Laborista Esperantisto



In het gebied van de Nederlandse taal

Redactie en Secretariaat van de Bond van Arbeiders-Esperantisten: Nepveestraat 33 II, Amsterdam-17, telefoon (020) 82177
Penningmeester F.L.E., Wingerdweg 53, Amsterdam-19, postgiro 331133 - Boekendienst F.L.E., Marnixstraat 57, Haarlem, postgiro 111278

La vivnivelo de la hungaraj laboruloj

La ĉi sube publikigita artikolo estas sendita al ni — kune kun multaj aliaj informmaterialoj — de la Loka Kongresa Komitato por la Universala Kongreso, ĉi-jare okazanta en Hungario.

Ni opinias la enhavon sufiĉe grava kiel kompara materialo por ni kaj certe ankaŭ tiuj legantoj, kiuj ne havas okazon en la baldaŭa estonto viziti landon kun „socialisma sistemo”, interesigas pri la progresoj en mez-eŭropa lando.

Eksterordinare komplika kaj malfacila tasko estas la mezurado de la vivnivelo, eĉ pli la internacia komparado, kies solvmetodojn tutmonde esploras la ekonomistoj. Ankaŭ tiu metodo, kiun ellaboris la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj, deiras el tio, ke la vivnivelo estas multlatera nocio, kiu enhavas ĉiujn plej gravajn elementojn de la vivcirkonstancoj, ĉu materiajn, ĉu nemateriajn faktorojn.

La plej gravaj vivnivelaĵaj komponantoj, kompilitaj fare de la fakkomitato de U.N., — per kio oni povas ricevi relative kompletan bildon pri la vivcirkonstancoj de la loĝantaro de iu lando — estas jenaj: sanitaraĵaj kaj nakiĝokvantaj interrilatoj; nutrado kaj nutraĵprovizado; publika instruado kaj faksperimentado; laborkondiĉoj kaj laboreblecoj; tutkonsumado kaj akumulado; trafikado, loĝejebleco, vestigaĵo, refreŝigaĵo, amuzado kaj sociala asekurado.

Estas nedisputeble, ke ĉiuj ĉi tiuj faktoroj estas gravaj formantoj de la vivnivelo, tamen la fundamentaj karakterizoj de la formigado de vivnivelo estas la konsumado de la materiaĵaj havaĵoj, la kvanto, kvalito kaj sortimento de la materiaĵaj havaĵoj kaj la uzoprenitaj disponigaĵoj.

Realsalajroj.

El la supremenciitaj sekvas, ke la formigado de la vivnivelo kaj konsumado de la laboristoj kaj salajruloj determinas precipe la formigado de la realsalajroj.

La realsalajroj de la gelaboruloj de Hungara Popolrespubliko -vivantaj el salajroj kaj pagoj — t.e. industriaĵaj, ŝtatbienaj gelaboristoj, teknikaj, administraciaj salajruloj, ŝtataj oficistoj, komercaj kaj trafikaj dungitoj, depost la liberigo de Hungarlando de jaro al jaro kreskas. Tiun tendencon interrompis komence de la kvindekaj jaroj nur provizore kelkaj ja-

roj, kiam la troaj ŝtataj investadoj ofendis la konsumadon de la loĝantaro. Sed ankaŭ tion konsiderante, inter la jaroj 1949-1962, la meza realsalajro de unu laborulo kreskis 58,2 procentojn.

Ĉar en jaro 1963 la indekso de la realsalajro plikreskis 4,7 procentojn — nome la nominalsalajroj pliboniĝis 3-4 procentojn, dum la konsumprezoj sekve de la favora rikolto de kelkaj agrarproduktaĵoj malaltiĝis 1,2 procentojn — tiumaniere depost 1949 la realsalajroj altiĝis 63-64 procentojn.

Parolante pri la formiĝo de la realsalajroj, ni povas aludi tion, ke la altiĝo de la realsalajroj, ludanta primaran rolon, ne estas la funkcio de la spontana procezo. La socialismaj planoj antaŭplanas ne nur la evoluon de la produktado, sed ankaŭ tiujn de la konsumado kaj vivnivelo. Konvene al tiu pliigas la ŝtato la nominalajn salajrojn kaj difinas la prezojn de la konsumartikoloj. Kaj ĉar la agrarproduktaĵojn plejparte encirkuligas la ŝtata komerco — escepte de la sezonproduktaĵoj: verdaĵoj, legomoj kaj fruktoj — laŭ fiksaĵaj prezoj, la formiĝo de la agrara rikolto nur malgrandmezure povas malboniĝi, aŭ pliboniĝi la realsalajrojn, kies laŭplana altiĝo tiumaniere estas ankaŭ ekonomie certigita.

Konsumado.

La plej certa provŝtono de la altiĝo de la realsalajroj estas: la konsumado. La detalkomerca vendado, nome la aĉetado de la loĝantaro — laŭ komparaĵaj prezoj — depost 1949 altiĝis pli ol 100 procentojn, do pli ol la realsalajroj de unu laborulo. Ties klarigo estas: 1. La altiĝon de la realsalajroj uzis la laboruloj unuavice por la plibonigo de siaj konsumado kaj provizado. 2. Dum la pasintaj dekkvin jaroj interŝanĝiĝis la socitavoloj, parto de la pli frue aŭtarkia vilaĝanaro — kelkcentmil homoj — fariĝis industriaĵaj laboristoj, kies nutraĵkonsumado jam pliigas la komercaĵajn vendojn.

La ekzemplo de la industrie evoluantaj landoj pruvas, ke la altiĝo de la realsalajroj kaj vivnivelo — se tiu procezo estas daŭra — ŝanĝas ankaŭ la konsiston de la konsumado. Nome: se la vendado kaj konsumado de la industriaĵoj altiĝas en pli rapida takto kiel tiu de la komercaĵoj, sekve de tio la valoro de la konsumitaj nutraĵoj ja kreskas, tamen ĝia kontingento

en la tuta konsumado malpliigas. Tiu fenomeno estas klarigebla per tio, ke la laboruloj eĉ okaze de pli malalta vivnivelo klopodas al kontentiga nutraĵkonsumado, aliflanke, se la vivnivelo daŭre pliboniĝas, antaŭeniĝas la aĉetado kaj konsumado de la industriaĵoj.

Tiu tendenco, kiu estas la netrompebla pruvo de la altiĝo de vivnivelo, estas spertebla ankaŭ en Hungarujo. En jaroj 1952-53 konsistigis 65-67 procentojn de la detalkomerca vendado la nutraĵoj, 24-25 procentojn la vestaĵoj kaj la daŭraj konsumaj industriaĵoj nur 17-18 procentojn. La proporcio de tiuj ĉefaj vargrupoj de tiam signife ŝanĝiĝis: dum la varvendado duobliĝis, malpliigis la proporcio de la nutraĵoj je 48-50 procentoj kaj tiu de la vestaĵoj je 21-22 procentoj, dum la proporcio de la daŭraj konsumajoj altiĝis je 28-29 procentoj.

La transformiĝo de la strukturo de konsumado eĉ tial estas pozitiva fenomeno, ĉar pliboniĝis ankaŭ la nutraĵprovizado de la loĝantaro.

Jara nutraĵkonsumado por unu loĝanto poŝare en kilogramoj:

	1956	1962
farunaĵoj	155	135
sukero	25	28
graso	23	23
viandoj	41	50
ovo	7	9
verdaĵoj-legomoj	72	77
fruktoj	46	64
lakto-laktaĵoj	91	104

Ĉi tie ni rimarkas, ke la popersona ĉiutaga konsumado atingas 4000 kaloriojn.

La vendado de la daŭraj konsumaj industriaĵoj altiĝis do ne je la malavantaĝo de la nutraĵ-konsumado, aŭ de la sinvestado, ja la vendado de la vestaĵoj altiĝis inter la jaroj 1959-62 pli ol 100 procentojn. La ŝanĝiĝinta strukturo de la konsumado estas la rezulto ekskluzive nur tiu de la pliboniĝanta vivnivelo, tiu de la daŭre altiĝanta realsalajro. Tion pruvas ankaŭ la ĉiam kreskantaj bankdeponaĵoj de la loĝantaro, kiu fine de jaro 1963 atingis 12 miliard-forintojn. La aĉetvaloron de la ŝparaĵoj montras: la jara enspezo de la nutraĵ-komerco estas 24-26 miliard-forintoj: Meritas atenton ankaŭ tiu fakto, ke la loĝantaro vivanta el salajroj ella ŝpa-

rita mono kaj parte helpe de ŝtata prunto, konstruas pojarne 35-40.000 familiajn domojn, aŭ loĝejojn.

Kion diras la komparo ?

La realvaloro de la enspezoj de hungaraj laboruloj estas malfacile konvertebla al iu alia valuto, ĉar la ŝtato difinas la konsumprezojn de la disponigoj kaj komercaĵoj grandparte laŭ sociaj kaj socialaj vidpunktoj kaj nature laŭ la disponebla ŝtoko.

La meznombra dividiĝo de la pomonataj elspezoj de laboristaj kaj salajrulaj mastrumadoj poperone:

	laborista salajrula mastrumadoj:	
nutraĵo, trinkaĵo, tabako	47,7%	41,4%
loĝeja lupago, hejtado kaj lumigado	7,4%	7,8%
vestaĵoj	15,2%	15,5%
daŭraj konsumvaroj	10,3%	12,2%
kosmetiko, purigado	3,4%	4,3%
klerigado, amuzado, trafikado	9,8%	13,3%
ceteraj elspezoj	6,2%	5,5%

Generale tio estas konstatebla, ke en Hungarujo la nivelo de la disponigaj prezoj — loĝeja lupago, hejtado, komunumaj disponigoj, trafikado — kaj la kulturaj havaĵoj kaj disponigoj — teatro, kinejo, ktp. — kompare al la salajroj estas multe pli malalta, ol en la evoluantaj industriaj landoj, la prez nivelo de la nutraĵoj estas esence sama, dum tiu de la industriaĵoj pli aita.

La sintezo de ĉiu komparo estas: la materia konsumado de la hungaraj laboruloj ankoraŭ ne atingas la nivelon de la laboristoj kaj salajruloj de pli evoluantaj kapitalistaj landoj — precipe el daŭraj konsumafaĵoj — sed samtempe sur kelkaj teritorioj — ekzemple instruado, klerigado, sanitaro — la hungaraj laboruloj ricevas pli larĝan provizadon, ol la laboruloj en la evoluantaj industriaj landoj.

La proporcio de la utiligo de la nacia enspezo aspektas en la ĉi lastaj jaroj jene: 2/3 por konsumado, 1/3 por akumulo.

Ĉi tiuj vivcirkonstancaj komponentoj, kiujn proponas la esplormetodo de U.N. por la mezurado de la vivnivelo kaj internacia komparo, en Hungarujo tre favore formigis depost la liberiĝo kaj pozitive efikas je la vivnivelo.

Stefano Garamvölgyi

(Tradukis el la hungara originalo d-ro Bálint Szemenyli - Orosháza)

Korektita ĉe la redakcio de L.E. nur gramatike.

Al la kongreso en Budapeŝto s-ro G. Maertens (belgo) organizis aŭtobusan karavanon, kiu foriros la 24an de julio kaj revenos la 13an de aŭgusto. Dum la alvojaĝo oni traveturos tutan Ĉeĥoslovakion, dum la hejmenvojaĝo Aŭstrion. Oni komprenu, ke oni ne simple traveturos la landojn, sed multfoje elĉariĝos por rigardi vidindaĵojn kaj kontakti lokajn esperantistajn grupojn. En Vieno ekzemple oni restos du tagojn. Krome oni vidos i.a. la Mozarturbon Salzburg kaj multajn belajn montajn kaj montetajn regionojn en Aŭstrio. Ĉeĥoslovakio estas malpli konata, sed ĝuste tial eble pli alloga, precipe por montamantoj, ekz. pro la ankaŭ vizitota naturparko de Tatromontaro kun multaj maloftaj animaloj. La vojaĝo kostos 8000 belgajn frankojn. Por pli da detaloj turnu vin al s-ro G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, Sint Kruis, Belgujo.

Hospitalo „D-ro Zamenhof“

Somera dimanĉo.

Super la pitoreska Roza Valo, etendiĝanta dekojn da kilometroj inter la montaroj Balkano kaj Sredna-Gora, la aero vibras pro varmego. Dronante en verdaĵo, vilaĝo Rozino kvazaŭ ripozas en silento.

De tempo al tempo al la distilejo de eteroleoj pasas veturiloj ŝarĝitaj de sekaj tigoj de mento, kies aromo plenigas la aeron.

Mi iras laŭ la ĉefa asfaltita strato kaj parolas kun mia hazarda kunvojaĝanto, avo Todor.

„La hospitalo estas ekster la vilaĝo,” li klarigas. „Nova bela hospitalo! E-e-h!” ĝemspiras avo Todor. „Se oni estus konstruinta ĝin pli frue, certe mia filino Conka estus ankoraŭ viva kaj sana, sed...”

La vizaĝo de la maljunulo malheligas. Post momento li daŭrigas:

„Iam en nia vilaĝo mankis hospitalo. Fame konata estis avino Peŝa, kiu ekzorcis kontraŭ malbona rigardo, „kuracis” per venenaj drogherboj, faris abortojn. Multajn gravedajn virinojn ŝi mortigis. Nun ne estas tiel. Ni havas hospitalon, kuracistojn, akuŝistinojn...” finis sian parolon avo Todor, kaj sur lia vizaĝo aperis rideto.

Absorbite per la interparolo, ni tute nerimarkite alvenas la periferion de la vilaĝo. En vasta, iom oblikva parko, sur la fono de Balkan-montaro, banate de sunradioj, staras nova konstruaĵo, sur kies balkono pendas ŝildo:

Regiona hospitalo „D-ro Zamenhof”, vilaĝo Rozino.

Mi dankas avon Todor kaj ni disiĝas. En la aleo de l' parko floras diverskoloraj rozoj. Ĉe la ŝtuparo kaj preter la muroj oni vidas nur florojn, florojn, florojn. Sub la tegmento estas multe da hirundaj nestoj, kie gaje pepas tien kaj returne flugantaj hirundoj.

En la hospitalo regas pureco kaj silento. Kuracistino Atina Damjanova ekzamenas malsanan laboriston Rifat Mustafov. En la laboratorio la hospitala flegistino Ĥristina Soplekova faras esplorojn. En sia kabineto la dentkuracistino Koeva plombas dentojn. En la infankonsulta ĉambro estas neniu, sed en la kartoteko staras centoj da kartonoj, kiuj parolas, ke ĉiu infano de unuĝis trijara aĝo estas dispensariigita. Ĉiuj infanoj ĝis la sepjara aĝo havas kartonojn kaj almenaŭ unu fojon en la jaro estas kontrolataj. En la infana atendejo regas silento. Ĉi tie trankvile kuŝas multe da pupoj kaj ludiloj. Jen estas la virina konsulta ĉambro. Ankaŭ en ĝi mi vidas neniu, ĉar dum festotagoj konsultado ne okazas.

La pura ŝtuparo kovrita de nova tapiŝo kondukas nin al la supra etaĝo. Ĉi tie troviĝas akuŝejo kaj ĉambroj por malsanuloj. Ĉu mi vizitu la malsanulojn?

Jes! Ĉiu malsanulo meritas atenton. Kaj tie ĉi ni vidas plej bone la zorgojn por la homo. 63-jarulino Nona Markova suferas de herpeso zostra (zon-erupcio). Ŝi kuŝas tute pala en la pura lito, sed d-ro Georgi Znamenidis, ĉelo de l' hospitalo, resanigos ŝin.

„La grave suferantajn malsanulojn ni

sendas al la hospitalo en la proksima urbo Karlovo,” klarigas al mi d-ro Damianova. Akuŝistino Zlatka Ĉolakova afable akceptas nin kaj petas pardonon, ĉar ŝi ne povas dediĉi tempon al ni. Ŝi ĉiumomente atendas naskiĝon de bebo. Kaj dum en la apuda ĉambro ni parolas kun feliĉa juna patrino Nermiu Asimova, kiu havas tritaĝan knabineton, el la akuŝkabineto venas infanploro.

Feliĉa momento: Naskiĝas nova homo! Ankoraŭ unu feliĉa civitano! Ni bondeziras, ke lia vivo estu brila, simile al la hodiaŭa suna tago.

Mi iras de ĉambro al ĉambro, rigardas purajn neĝblankajn litojn, puntajn kurtenojn, kovrilojn sur tabletoj kaj florojn en vazoj, mi vidas ridetojn de feliĉaj naskintinoj, dormantajn kvietajn bebojn, medicinajn laboristinojn... kaj nevole mi rememoras pri la rakonto de avo Todor, kies filino Conka, pro manko de akuŝistino, estis mortigita per venenaj drogherboj de avino Peŝa.

„En nia regiona hospitalo” klarigas kuracistino Damjanova” la kvanto de naskiĝoj estas plej granda en Plovdiva distrikto: jare 190 infanoj, ĉe loĝantaro malpli ol 10.000. La hospitalo „D-ro Zamenhof” priŝervas kvin vilaĝojn. Ĝi havas kuracistan kaj dentkuracistan kabinetojn, laboratorion, infan- kaj virin-konsultejojn, akuŝdomon kun 5 litoj, malsanulejon kun 8 litoj. Ĉi tie laboras du kuracistoj, dentkuracistino, du akuŝistinoj, du hospitalaj flegistinoj, 4 sanitaristoj kaj helpa personaro.” La historio de la hospitalo estas jena:

La komunumo Rozino, al kiu apartenas 4 aliaj vilaĝoj, longan tempon cerbumis, kiel solvi la problemon pri hospitalo. Fine oni decidis konstrui hospitalon per liber-vola kolektiva laboro. Afero ne tre facila, sed tamen ebla. La konstruado daŭris kelkajn jarojn. Dum tiu periodo la Esperantomovado en vilaĝo Rozino bone kreskis dank' al la agado de energia kaj entuziasma s-ano, inĝeniero Georgi Arnaudov. Estis fondita Esperanto-Societo „Roza” kun kelkaj dekoj da membroj. La esperantista movado antaŭenigis la kulturklerigan laboron en la vilaĝo, speciale inter la junularo. La esperantistoj iniciatis la establon de Festotago de Rozoj, kiu fariĝis tutlanda. Ili sukcesis gajne; la fidon kaj la estimon de la lokaj kaj distrikta politikaj kaj administraj faktoroj. Ili proponis, ke la nove konstruita hospitalo estu nomata „D-ro Zamenhof”. La propono estis unuanime akceptita. Dank' al tio, la nomo de Zamenhof fariĝis populara en la tuta regiono, kaj Esperanto ĝuas ĝeneralan rekonon.

Sento de kontenteco kaj fiero plenigas mian koron. La nomo de Zamenhof, de la homo, kiu vivis modeste, laboris obstine, kiu kreis kaj testamentis al la homaro la lingvon Esperanto, estas senmorta. Tiun nomon portas bulgara ŝtata hospitalo, sola en la mondo, en tiu ĉi unike bela loko de la Valo de Rozoj.

Ivan Sivarov.

(El „Nuntempa Bulgario, n-ro 1 1966.)

Abonantoj,

kiuj ĝis nun ne pagis la abonmonon por LE por la 1966a jaro, estas petataj fari tion nun. En kazo de ne-pao la sekvontaj numeroj de nia organo ne plu estos sendataj.

Neologismoj en Esperanto

D-ro William Solzbacher

Esperanto estas vivanta kaj tial ankaŭ kreskanta lingvo. Ĝi daŭre „sorbas” internaciajn vortojn el la ŝanĝiĝanta vivo de la scienco, kulturo kaj politiko, senĉese naskas kunmetitajn formojn kaj pliriĉigas per novaj radikoj. La maniero, en kiu tio okazas, kaj eĉ pli la rapideco de la evoluo prezentas problemojn, kiuj ne ĉiam estas bone komprenataj kaj pri kies solvo povas ekzisti diversaj opinioj.

Vortaroj en ĉiuj lingvoj havas la taskon „registri” vortojn ekzistantajn kaj doni rekomendojn pri ilia uzo. Esperanto-vortaroj tamen ofte ne kontentiĝas pri tiu rolo, sed prezentas kaj proponas radikojn, kiujn ankoraŭ neniu — aŭ preskaŭ neniu — uzis. Ili tion faras en la nomo de la „logiko”, de la „lingvo-normigo” aŭ de la „neceseco pliriĉigi la lingvon”. Tiu fakto preskaŭ ĉiam elvokas kritikojn aŭ eĉ pasiajn atakojn. Ĝi ankaŭ iomete malhelpas la uzadon de tiuj vortaroj.

En la pasinta jaro, kiam aperis la *Suplemento* al la *Plena Vortaro* (kompilita de Profesoro Gaston Waringhien), la *Boletín* (Bulteno) de la Hispana Esperanto-Federacio publikigis (en Oktobro 1954) recenzon de Luis Hernández. Li diris, ke li ne povas „honeste rekomendi la balaston, kiun oni alkroĉis al la bonega Plena Vortaro en ĝia kvara eldono”. En sian artikolon li enmetis leteron — spicitan per neologismoj el la *Suplemento* — ricevitan de unu el siaj amikoj. Jen ĝi estas:

„Inĝenia ogreto: Povra kaj trista peticio estas la mia, kaj eble sterila; sed mi ne avancis en la basa kaj turpa vertiĝo korodi, devaluti kaj diskrediti la feblan ESPERANTON (jes, per majuskloj), prodigante pletore kaj orgojle la partikularan selekton, leĝere faritan ne de obskura vagabonda reformatoro, sed de ĝirema direktivestro, kiu ascendis sen truko, spano post spano, lante kaj tarde, kaj nun bone dominas la lingvon; tamen laŭŝajne kontagita de la piruetoj faritaj de kamuflita maskerado de pigraj uzurpatoroj de la vera profesio de literatoro, antaŭ ankoraŭ ne unu trimestro, eksponis kaj lanĉis skeĉon de eksplicitaj kaj hastaj esperant-eskaj fivortoj. Mi estas poltrona kaj timida, sed plenumas la duran devon molesti vian atenton per horora desfilo de nur kurta primico de tiaj *fajnaj* fiaskendaj vortaĉoj, neuzitaj en la paseo, kun reklamacia peto al masklaj esperantistoj por tujaj prohibicio, ĉio en sia demarkacio, sen rekviemo nek humidaj suspiroj tepidaj, ĝis decidis oportuna plebiscito. Via olda filibustro, *Ernesto Guillem*.”

S-ro Hernández protestis kontraŭ la „lavango” da neologismoj en la *Suplemento* kaj eĉ parolis pri „kvina kolono celanta detruiri interne nian lingvan unuecon.” Li diris, ke tia amaso da neologismoj „cetero kreos konfuzojn kaj ĝenojn al la mezkapablaj Esperantistoj, kiuj fakte estas la plej nombraj elementoj en nia popolo.”

Al Luis Hernández respondis en la *Bo-*

letín de Aprilo 1955 Donald R. Broadribb el Usono, prezentante le argumentojn de la neologismemuloj en forta, eĉ ekstrema, formo. „Ĉu ni estas barbaroj, kiuj devas balbutadi per kelkcent vortoj?”, li skribis. „Kial estas malpermesate, de tiuj protestemaj personoj, havi riĉan vortaron? Ĉu estas nur akcidento, ke la plej kulturaj lingvoj de la mondo estas ankaŭ la plej grandaj? . . . Kial al verkanto estu malpermesate diri *diktionario*, vorto uzata en ĉiu okcidenta lingvo, nur ĉar iu kapriculo preferis traduki germanan kombinivorton (*vortaro*), kiu povas egale signifi la tutan lingvon? . . . Kial en Esperanto neniu rajtu *developi* ideon, sed nur ĝin *disvolvi*, kvazaŭ temus pri fadenoj vinditaj ĉirkaŭ stangeto?”

S-ro Broadribb havas interesan kaj diskutindan argumenton, sed malbone elektis siajn ekzemplojn. *Vortaro* ne estas analoga al la germana *Wörterbuch* (kiu estas *vortlibro*), sed sekvas la slavan kaj latinan ekzemplon. En rusa lingvo *slovo* estas vorto, *slovar'* vortaro. *Slovar* en slovena *slovník* en ukraina *slovník* en ĉeĥa kaj slovaka, *slownik* en pola, *rečnik* en serbo-kroata kaj bulgara lingvoj estas formataj ekzakte kiel vortaro en Esperanto. La latina *dictionarium*, de kiu devenas la angla, franca, itala, hispana kaj portugala vortoj, en laŭvorta traduko estas *diraĵaro*, do ankaŭ formata kiel vortaro en Esperanto. Pro diversaj kaŭzoj *diktionario* ne estas taŭga vorto en Esperanto, sed ja ekzistas samsignifa oficiala vorto *leksikono*. (La difino de *leksikono* en la *Plena Vortaro*, „mallonga vortaro sen ekzemploj”, estas malbona; la *Vortaro de Esperanto* de Kabe simple egaligas la du vortojn. Se la franca *lexique* ofte estas uzata por malgranda vortaro, la angla kaj germana *lexicon* preskaŭ ĉiam signifas tre dikan vortaron aŭ enciklopedian verkon). — Pri *disvolvi* kaj *developi* oni povus diri, ke ili havas la saman etimologion kaj ke la franca *développeur* fakte signifas ankaŭ „disvindi fadenon”; ĝi estas la malo de *enveloppeur*, de kiu venas la angla vorto *envelope* (koverto).

Sed ni revenu al la baza argumento de Donald Broadribb: „Lingvo devas posedi ĉiun vorton necesan. Por ĉiu aparta ideo devas esti aparta vorto aŭ formo. Estas falsa ŝparo, ŝpari vortojn, rifuzante permesi al verkisto, esprimi tion, kion li volas, ĉar oni ne volas plian vorton.”

Ĉu Sinjoro Broadribb estas prava aŭ malprava? La respondo ne estas facila kaj povas konsisti en simpla *jes* aŭ *ne*. Se mi volus doni proksimuman kaj mallongan respondon, mi dirus, ke mi konsentas pri la unua frazo kaj la tria frazo en la citaĵo, sed ne pri la dua.

Esperanto devas esti kapabla esprimi ĉion, sed ĝi ne bezonas kaj ne povas havi apartan vorton por ĉiu aparta vorto aŭ ideo en ĉiu nacia lingvo.

Neniu lingvo havas apartan vorton por ĉiu aĵo aŭ ideo. Eĉ la plej „riĉaj” lingvoj kelkfoje estas „malriĉaj”. Ekzemple la angla lingvo, kies vortaro enhavas centmilojn da vortoj, uzas la saman vorton

law por *leĝo* kaj *juro*, la saman vorton *fire* por *fajro* kaj *brulego*, la saman vorton *step* por *paŝo* kaj *ŝtupo*. Angle parolantaj personoj kelkfoje estas blindaj pri tiaj diferencoj, kun rezulto, ke antaŭ kelkaj jaroj *Universala Esperanto-Asocio* titolis fakvortareton *Leĝa Terminaro* (anstataŭ *Jura Terminaro*) kaj ke oni kelkfoje aŭdas la strangan vorton (tute nekompreneblan al neanglalingvanoj) *leĝisto* anstataŭ *advokato* aŭ *juristo*.

Aliflanke ĉiuj lingvoj, eĉ la plej „primitivaj”, estas treege „riĉaj” je terminoj, kiuj rilatas al la vivmaniero de la popolo. En la *aleuta* lingvomia informfonto estas la gramatiko kaj vortaro de Richard H. Geoghegan, unua Prezidanto de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko — ekzistas vortoj kiel *ixsgiq* („loko, kie marleonoj eniras la akvon”), *muxsxaq* („marleona stomako entenanta parte digestitajn fiŝojn, manĝata kiel frandaĵo”), aŭ *qigadaĝinan* („personoj loĝantaj oriente de la insulo Unalaska”). Nek la angla lingvo nek Esperanto povas traduki tiajn vortojn de la „primitiva” aleuta lingvo sen klarigaj frazoj por doni la ĝustajn signifojn.

Aŭ pripensu la kazon de la riĉega araba lingvo. En ĝi ekzistas proksimume mil vortoj, kiuj signifas *kamelon*, mil vortoj, kiuj signifas *ĉevalon*, kvincent vortoj, kiuj signifas *glavon*, kvincent vortoj, kiuj signifas *tigran*. Ĉiuj havas iomete malsaman senconuancon. Kiu povus plene traduki tiajn nuancon en alian lingvon? La fama *Fiqhul-Lughat* („Filozofio de la Vortaro”) de Tha' alabi klarigas kelkajn el la delikataj nuancoj de la araba vortrezoro. Ekzistas ekzemple vortoj esprimantaj la gradojn de dikeco de virino. Se virino estas modere dika kun delikataj proporcioj inter la korpopartoj, ŝi estas nomata *rebahlah*. Se ŝi estas pli dika, sed ne sufiĉe dika por esti malbela, ŝi estas *sebahlah*; se ŝi estas dika kaj malbela, sed ne tre, ŝi estas *mufazah*; se ŝi estas treege dika, ŝi estas *ifdaĝ*. Bela virino estas nomata *ĝamilah* aŭ *vazi'ah*; se ŝi estas tiel nature bela, ke ornamaĵoj nenion aldonus al ŝia beleco, ŝi estas *ghaniah*; se ŝi estas bela kaj indiferenta pri ornamaĵoj, ŝi estas *mi'tal*; se ŝia beleco estas brilega, ŝe estas *vasimah*; se ŝi estas abunde bela, ŝi estas *qasimah*, kaj se ŝi estas pli bela ol iu el tiuj vortoj povas esprimi, ŝi estas *rav'a*. Ŝajnas, ke poetoj devus lerni la araban lingvon!

Ofta argumento estas, ke granda nombro da neologismoj estas necesa en la literatura uzo de Esperanto. D-ro Kolomano Kalocsay bone prezentis ĝin en sia artikolo pri *Neologismoj* en la *Enciklopedio de Esperanto*: „Rilate al la neologismoj kolizias du vidpunktoj inter si kontraŭaj: tiu de la simpleco kaj facileco kaj tiu de la riĉeco kaj literatura taŭgeco de la lingvo. La kolizio ŝajnas nepacigebla, ĉar nek la propagando povas rezigni pri la granda altirforto de la facilo kaj simpla, nek la literaturo pri la esprimforto kaj vortriĉo, sen kiuj vera literaturo, transdonanta ne nur la nudan penson, sed ankaŭ delikatajn nuancojn, metaforajn vortaplikojn, duonklarajn aludojn entenantajn de vortoj, estas kaj restas nur pia revo. La problemo ŝajnas solvebla nur per la apartigo de la 'poeziaj vortoj', t.e. vortoj uzataj nur en la alta literaturo. Per tio la vulgara lingvo povus resti neembarasata de la literatura lingvo-evoluo.”

(daŭrigo sur la sekva paĝo)

Lernu ludante, ludu lernante

J. W. Minke

Denove mi devas raporti al vi pri iu mistrafo en la enigmo de la marta numero. Tiun ĉi fojon vere temas pri preseraro: la kompostisto kredeble deziris fari enigmon. **en** nia enigmo, kiu jam estis sufiĉe enigma! Ĉe 14: **grandaĝa** li legis **grandega**. Tamen, kelkaj el vi, kiuj eble jam dum jaroj solvas enigmojn kaj do konas la metion ĝisfunde, „flaris” la embuskon kaj ĝuste uzis „maljuna”. Kelkaj aliaj skribis „miljara” kion mi ankaŭ povis aprobi, ĉar Metusalemo, kiu atingis la aĝon de 969 jaroj, sen ia dubo estis rigardata kiel „grandaĝa” kiam finfine la morto vokis ankaŭ lin. Sed vi estu trankvila: ankaŭ la trian solvon, nome „majesta” mi akceptis, pro la preseraro.

La ĝusta solvo estas: turniro — rabisto — atribui — drenilo — epitafo — nivelil’ — sekreto — akapari — monoklo — anapest’ — legomoj — lunlumo — urbodom’ — maljuna — okulumi — bazalto — rosmaro — indulgo — librejo (libraro) — eskorti — trajtoj — ananaso — sandalo — legendo — aŭstrio — cipreso — embusko — limonad’ — ora suno.

Solvojn mi ricevis de: S. Aarse — D. Blanksma — J. H. Bredenoord — Apeldoorn (bonvenon!) — B. Busscher-Tuin — N. J. v. Dijk — J. R. van Eynde — H. Hooghuis — H. Keuter — J. Kuijpers — Mia Maatman — Syfke Musch — H. Oudenhoven-Bishoff — G. J. Rodenhuis-Boll — F. Smit — R. Vos-Uil — E. Weiberle kaj de P. J. van Tol en Wormer, al kiu mi, laŭ ordono de Sinjorino Fortuna sendis la liston da premio-libroj kune kun miaj gratuloj.

La projekton de la nova enigmo mi severe kontrolis antaŭ ol sendi ĝin al nia ĉefredaktorino, ĉar mi deziras eviti erarojn almenaŭ miaflanke. Se ankaŭ la kompostisto bonvolas kunlabori, tiu ĉi nova enigmo ne kaŭzos kapdoloron al vi. Mi konsentas tamen, ke la solvo postulos iom da detektiva talento. Mi prezentas al vi 24 kvinliterajn vortojn, alfabete aranĝitajn:

adori — alpoj — arako — diino — drako — erbio — kardo — karno — konto — kosma — kremo — nevoj — norma — parko — pasto — perlo — pesto — salto — ŝtopi — titro — trabo — truto — turbo — virto,

kaj petas al vi, formi el tiuj vortoj 24 **aliajn vortojn**, uzante la samajn literojn, ŝanĝante nur la sinsekvon. Tiujn 24 novajn vortojn vi skribu unu sub alia, tiel ke el la mezaj literoj formiĝas la proverbo: **akiro kaj perdo rajdas duope**.

Mi volas helpi vin iom ĉe via detektiva laboro, ĉar mi deziras eviti, ke iu el vi malsaniĝos sekve de longa kaj pena cerbumado pri la ĝusta solvo. Vi povas rezoni tiel: se la meza litero de la formenda vorto estu „j” mi devas elekti inter la supre menciita vico de 24 vortoj nur tiujn, kiuj havas en si „j”. Tio estas nur **alpoj** kaj **nevoj**. Pli da ili ne estas. Kiujn vortojn mi povas formi el **alpoj** kaj **nevoj** kun „j” en la mezo? Jen metodo, kiu nepre kondukos al sukceso! Por ke via solvo estu sama kun la mia, mi petas al vi meti la trovendajn vortojn alfabete sur ilia loko, ĉar tion mi ankaŭ faris. Por igi la aferon pli klara, mi donos al vi ekzemplon kun imagaj vortoj. En la proverbo

Esploru vian scion!

H. Kujt

OPGAVE 4

Toen het ogenblik kwam, waarop we werden uitgenodigd in de bibliotheek te komen, waar de sèance plaats zou hebben, waren we allemaal, zonder uitzondering, nieuwsgierig en goedgehumeurd. Zelfs de twijfelaars onder ons hadden het gevoel van gespannen verwachting, dat iedere goochelaar bij zijn publiek probeert te wekken. We hadden heimelijk het gevoel, dat het wel grappig zou zijn ons voor de gek te laten houden. Hoe het zij, de stemming was uniform tot-samenwerking-bereid en zo gingen we de bibliotheek binnen.

Het bewuste vertrek was als geknipt voor dat, wat we van plan waren. Het was heel groot en hoog; de wanden waren beschooten met donker hout en de zoldering werd gedragen door zware balken, die de gehele structuur torsten. Drie van de wanden werden ingenomen door grote boekenkasten met ontelbare werken en de vierde muur aan de zee kant — had twee grote ramen, waarachter nu niets dan duisternis te zien was. Daarbij deed de druk van de wind de grote ruiten trillen.

Grote schemerlampen zorgden voor een warm, gedempt licht en in de haard brandde een flink vuur.

Wij gingen zitten en vol verwachting keken we naar de deur, waardoor de vreemdeling moest verschijnen. In ons hart hoopten we, dat hij er een interessant kijkspel van zou maken.

Daarin werden we niet teleurgesteld.

VERTALING VAN OPGAVE 3.

Ĉi tiun vesperon la deĵoranta servistaro estis ĝenata de maltrankvila paciento kaj ĝi devis revenigi la junan kuraciston de bankedo, kiun li partoprenis kiel gasto. Dauris longan tempon antaŭ ol oni fine sukcesis trankviligi la pacienton per senkonsciiga medikamento.

La kuracisto eniris la parkon por enspiri freŝan aeron antaŭ ol enlitigi, ĝoja ke fariĝis tro malfrue por reiri al la festanta societo. Tiu sento de liberigo estis restajo de timemo el liaj knabaj jaroj, kvankam nuntempe renkonto kun aliaj homoj ne plu maltrankviligis lin. Li ankaŭ ne tute neglektis la agrablan senton esti ŝatata juna kuracisto en sia malgranda urbo.

Estis sensone kaj tre mallume, kelkaj palaj someraj steloj briletis sur la ĉielo. Senformaj noktnebuloj senmove kuŝis kiel falintaj nuboj sur la malseketa herbejo antaŭ la okcidenta muro de la parko.

Li atingis la antaŭan ĝardenon de la domo, kie li kaj du aliaj kuracistoj havis siajn ĉambrojn.

Bruo de metalo rompis la silenton kiam la grandaj feraj kradporoj malfermiĝis. La juna kuracisto retiris sin, li estis laca.

supre menciita aperas la litero „a” kvar fojojn: se la 4 vortoj kun „a” en la mezo estus **flati**, **abato**, **stato** kaj **knabo**, vi preferu loku ilin sur linioj 1. **abato**; sur linio 7. **flati**; sur linio 15. **knabo** kaj sur linio 18. **stato**. Tiel vi alfabete aranĝis la kvar „a” vortojn, same kiel mi faris kaj tiel ni atingos homogenan solvon. Tiun vian solvon vi bonvolu sendi rekte al: J. W. Minke, Veeteelstraat 144, Amsterdam, plej laste 15.7.66.

Antaŭ la elementa ekzameno

C. P. Westerveld

OPGAVE 3

In Zürich bouwde men een museum voor de wereldberoemde architect Le Corbusier. Tot kort voor zijn dood heeft hij de voorbereidingen persoonlijk geleid en gecontroleerd.

Het zal het enige bouwwerk van betekenis van hem zijn in zijn geboorteland.

Het ontstaat midden in het park aan het meer, in de nabijheid van Zürichhorn.

Door zijn buitengewone stijl zal het een nieuw kenteken van Zürich en een grote attractie voor toeristen worden.

Het bestaat uit geprefabriceerde elementen van staal en glas met een façade van emaille in contrastrijke Mondriaan-kleuren. Naar men zegt, zal zijn hele kunstnalen-schap in dit museum permanent geexposeerd worden.

Deze bestaat uit originele grafieken, olieverschilderijen, beeldhouwwerken, wandtapijten, lithografieën, kopergravures enz. Het museum zal een uitgebreid overzicht geven van het werk van Le Corbusier.

Behalve de zalen voor tentoonstellingen, lezingen en filmvoorstellingen bevat het gebouw een door L. C. ontworpen en ingericht model woonhuis.

Men hoopt, dat dit unieke monument voor een van de succesvolste en invloedrijkste architecten op 6 oktober van dit jaar geopend kan worden.

Dan zou L. C. namelijk 79 jaar geworden zijn.

Ni iomete konsideru tiun argumenton. Sendube poeto kaj literatura verkisto havas la rajton esprimi sin en formoj diferencaj de tiuj de komerca letero, scienca traktato aŭ kongresraporto. En iu senco sciencistoj, komercistoj, inĝenieroj, bankistoj, filozofoj kaj tiel plu parolas apartajn „lingvojn”. Oni povas eĉ diri, ke ĉiu poeto — ĉu en Esperanto, ĉu en la angla, ĉu en la hotentota lingvo — parolas sian propran, tute individuan „lingvon”. Tamen ĉiu uzanto de Esperanto devas respekti ĝiajn bazajn principojn, inter kiuj ŝparemo pri radikoj estas unu el la plej gravaj. La poezia lingvo povas eluzi la specialajn kvalitojn de Esperanto, precipe la senfinan trezoron de kunmetitaj vortoj. Mi ne diras, ke neologismoj devas ĉiam esti evitataj, sed ili devus esti uzataj modere kaj singarde. Se oni enkondukus ilin amase, oni kreus du tute malsamajn Esperanto-dialektojn. Tiuj, kiuj volus legi la „altan literaturon”, ne nur devus lerni multajn novajn radikojn, sed devus tuj poste „mallerni” ilin, por ne enmeti ilin en la ĉiutagan („vulgaran”) lingvon.

Kelkaj el la „literaturaj” neologismoj estas kritikindaj ankaŭ pro aliaj kaŭzoj. La vorto *bunta* (diverskolora, varikolora), ekzemple, kiun mi legis en artikoloj tute ne apartenantaj al la „alta literaturo”, ne estas internacia, sed troviĝas nur en la germana kaj nederlanda lingvoj. Sed la germana *bunt* kaj la nederlanda *bont* havas pli vastan sencon ol la proponata Esperanto-radiko *bunt-*, ĉar en tiuj naciaj lingvoj ĝia signifo estas ne nur *multkolora* kaj *diverskolora*, sed ankaŭ simple *kolora*, t.e. nek blanka nek nigra. La vorto *bunta* certe estas belsona kaj mallonga, sed kiom da konfuzo ĝi povas kaŭzi! (El Amerika Esperantisto.)

Anton Vollegraaf forlasis nin...

Profunda ĉagreno kaptis nin kiam ni aŭdis la konsternan sciigon, ke je mardo la 17a de majo subite mortis nia kamarado Anton Vollegraaf.

Estas malfacile en kelkaj linioj sekizi kiel terura tiu bato de la sorto estas ne nur por nia sekcio, sed por la tuta laborista esperantista movado en nia urbo, en la lando kaj en la mondo.

Estante juna homo, knabo ankoraŭ, Vollegraaf estis kaptita de la zamenhofa ideo, li lernis la lingvon, aliĝis nian movado kaj jam baldaŭ fariĝis estrarano de nia tiam ankoraŭ juna sekcio.

Kaj de tiu tempo li dum dekoj da jaroj restis fidela sur sia posteno, servis la movadon en ĉiaj funkcioj. Li estis kasisto, poste dum multaj jaroj sekretario ĝis li fine, post la milito, akceptis la postenon de prezidanto. Li travivis la gloran progreson de nia movado en la antaŭmilitaj kaj postmilitaj jaroj kaj poste ĝian stagnon, ĉiam kun nedetruibla persisto daŭrigis la laboron, ne lasis sin, malgraŭ la malfacila situacio en kiun nia movado kelkajn jarojn post la milito trafiĝis, deprimi, sed ĉiam denove perĉis novajn vojojn, novajn metodojn por teni kune la fidelulojn kiuj restis.

Okaze de la morto de k-do Glodo oni iam skribis en Sennaciulo: „K-do Glodo lasis nin orfaj”. Nu, kun la samarajto ni povas nun diri, ke Vollegraaf lasis nin orfaj, ĉar li pli ol iu ajn metis sian stampon sur nian sekcion, li pli ol iu ajn estis la flosilo sur kiu nia sekcio drivis.

Ni ofte kun miro kaj admiro observis lian nedetruiblan persistemon, vidis kiel post ĉiu malsukceso, post ĉiu seniluziigo li ree kaj ree klopodis, venis kun aliaj ideoj adaptitaj al la ŝanĝiĝinta situacio. La nombro de tiuj, kiuj ĉe li lernis nian lingvon aŭ kiuj ĉe li perfektigis sian lingvoscion estas malfacile taksebla kaj multaj kun danko rememoras la „gramatikvesperojn”, kiujn li gvidis.

Kaj ne nur en la sekcio li estis la energi-radiana ekzemplulo. E la loka organizo, en la distrikto, en R.E.K., en la landa organizo kiel ano de la Konsilantaro li okupis gravajn lokojn, dum ankaŭ internacie liaj meritoj estas grandegaj. Dum multaj jaroj li plej fidele plenumis diversajn taskojn por SAT, prizorgis la ekspedon de SAT-libroj el Rotterdam, faris gravan aboron por a ekspedo de Sennaciulo kaj ludis gravan rolon en la OKK de

la 30a SAT-kongreso en Rotterdam en la jaro 1957.

Oni diras, ke neniuj homoj estas ne-antaŭaŭgebla. Efektive, sed neniuj el ni povas nun imagi kiel la lokoj, kiujn li nun devis lasi vakaj, iam povis esti reokupataj, neniuj el ni povas imagi nian sekcion sen li.

Kaj ni ĉiuj havas amarajn sentojn pripensante, ke la morto forrabis de ni tiun homon en la aĝo de nur 55 jaroj, neniuj povas formeti la maldolĉan penson pri la bono, kiun li povus esti farinta por nia movado, se la sorto estus doninta al li nur tempon...

Al la edzino, kiu ĉiam fidele subtenis lin en liaj aktivecoj, kiu mem ĉiam aktive partoprenis liajn laborojn, ni esprimas niajn plej sincerajn kondolencesprimojn. Ke ŝi trovu iom da konsolo en la pripensoj, ke Anton neniam estos forgesata de ni, kiuj en la daŭro de tiom da jaroj fariĝis pli ol „samideanoj”, nome amikoj...

CvE

Al nia neforgesebla kamarado

Anton Vollegraaf

*Firiĝis homo el la mond'
Abrupte el nia vivo
Fidela estis li en rond'
De l' Esperant-aktivo.*

*Foriĝis homo el la mond'
Kun altaj idealoj
Batalis pene por l'estont'
Por bonaj la moraloj.*

*Foriĝis homo el la mond'
Sincera kamarado
Estis lin la tuta rond'
De verda la movado.*

*Batalis vi ne per la glav'
Sed per homam-sagaco
„Saluton! Anton Vollegraaf
Ripozu vi en paco!*

W.G.

De la Asocia estraro

Ni petas desegnaĵon por nova gratulkarto

Inter niaj membroj verŝajne estas kelkaj, kiuj sufiĉe bone scias desegni kaj samtempe povas bildigi niajn ideojn. Ili helpu por ke nia gratulkarta agado havu novan bildon. La karto kiun vi mem ricevis pro via naskiĝdato, modelas kion ni deziras laŭ formato, koloroj ktp. Ne hezitu longe, ni devas uzi ilin post maksimume du monatoj.

★

Listo de parolantoj

Antaŭ kvin jaroj ni kunmetis tian liston kaj dissendis ilin al niaj sekcioj. Kompreneble post kvin jaroj utilas renovigi tiun liston. Nun ni faras tion en la kadro de FEN. Nia malnova listo estas uzata, strekita kio ne plu taŭgas kaj aldonita kio estas aktuala. Se vi havas interesajn temojn por fari pri ili prelegon kaj se vi estas bona preleganto, bonvolu informi pri tio la Asocian sekretarion: Nepveustra 33, Amsterdam-17.

En la nova listo kompreneble estos ankaŭ la nomoj de personoj el aliaj asocioj, kunlaborantaj en FEN.

★

Laŭ kongresdecido ni aperigos estonte unu julian/aŭgustan numeron, kiu aperos ĉirkaŭ la 27a de julio.

La eldono de „Esperanto Wint Veld” kiu en la pasintaj jaroj aperis samtempe kun la aŭgusta numero de LE, ek de tiu ĉi jaro fariĝos parto de la septembra numero. Pro varbado en la verda monato ĝi aperos ĉirkaŭ la 8a de septembro.

S.A.T.-rondoj ★

AMSTERDAM
Curiestraat 22

La 22-an de majo nia tre sperta samideano k-do K. G. J. de Jong, havis la lastan vicon en nia vintra programo pri la ĵus-okazinta IFEF-kongreso en Utrecht. Ni vere tre ĝojis efektive aŭdi pri la kongreso **mem**. Multfoje se oni raportas pri kongreso, estas rakonto pri la vojaĝo! Kaj ĝuste la enhavo de la raporto estis por ni, SAT-anoj, tre interesa. Multaj vizitis tiun ĉi lastan kunvenon. Eĉ kelkajn partoprenintojn en la IFEF-kongreso kondukis k-do De Jong al ni!

Tiuj samideanoj el Hungario kaj Ĉeĥoslovakio donis al nia lasta SAT-kunveno tre specialan karakteron. Ni tre dankas k-don De Jong **kun siaj ŝatataj gastoj** pro la altvalora kunlaboro en nia programo!

Ek de la 1a de januaro 1966 validas jena poŝara kotizo: unuopa membro f 10,75; geedza paro f 16,50; samfamiliano f 5,75; Sennacieca Revuo f 3,30.

Al tiuj, kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon, ni afable petas, ke ili nun tuj faru tion al k-do B. Bultemeijer, Maassluisstr. 25, Amsterdam-17, Gemeente Giro Amsterdam, no. B-10584!

Al la partoprenontoj de la SAT-kongreso ni deziras agrablajn kaj interesajn tagojn en SWANWICK kaj al ĉiuj aliaj, kiuj ferias aliloke, ni deziras agrablajn feriojn! Pri la unua kunveno post la somero la membroj atentu la anoncojn en „Laborista Esperanto” kaj en la „Zamenhofa-Gazeto”.

Ĝis la revido! Post refreŝiĝo kaj refortigiĝo denove al aktiva laboro, verŝajne en oktobro!!!
D. Veen, sekretario.

Literatura Kurso

Ĉu vi konas la unuan tradukon en Esperanton? Tiu verketo el la unua jaro de nia lingvo ne plu estas akirebla, vi povas legi ĝin en nia

Literatura Kurso.

ĉijare komencita.

Aliĝu tuj!

Prezo f 40,—.

Por FLE-anoj f 35,—.

Instrua Servo FLE,
Nepveustra 33, Amsterdam-W.

La maja numero de LE, pro redakciaj malfacilaĵoj ne enhavis la Lingvon Rubrikon. Ni petas pardonon de la legantoj.

Pri la 18-a IFEF-kongreso en Utrecht

La pasinta sabato estis la unua tago de plensemajna kongreso de la Internacia Federacio de Fervojistaj Esperantistoj. En la vespero de tiu tago okazis interkona festeno en la granda konstruo de la nederlanda fervojista- kaj transportista sindikato. Proksimume 350 homoj el 18 landoj tie salutis malnovajn amikojn kaj metis la bazon por novaj amikecoj. Programo laŭ la kutima senco de la vorto ne estis, sed ĝuste la kunestado de kelkaj centoj da homoj parolantaj nur unu lingvon, pro tio ekhavis apartan ĉarmon. Je la dimanĉa vespero okazis la solena malfermo. Ĉeestis pluraj membroj de la honora komitato, i.a. iliaj mostoj la ŝtata sekretario de Trafiko kaj Akvostato, ing. Posthumus, la prezidanto-direktoro de la nederlanda Fervoja Kompanio, ing. Lohman, d-ro Dorjee, la direktoro de la ĝenerala transport- kaj ekspeda kompanio Van Gend en Loos, s-ro Alink, la prezidanto de la Dungitara Konsilantaro de la nederlandaj fervojoj, kaj s-ro Kasje, la supera staci-estro de Utrecht. Verŝajne unika fakto estas, ke neniu el la eminentaj gastoj kiuj salutis la kongreson, parolis eĉ nur unu vorton en la nederlanda aŭ alia nacia lingvo. Ili ĉiuj uzis la lingvon Esperanto kaj el ili iuj eĉ preskaŭ senriproĉe.

La kongresa tagordo menciis vastan skalon da diversspecaj kunsidoj. Funkciis la IFEF-junulara sekcio, okazis la serioza laboro de la terminara komitato, kunsidis la asocia estraro kun la IFEF-komitato. Gravaj estis ankaŭ la ĝeneralaj laborokunsidoj.

Okazis fakprelego, ekskursoj al diversaj entreprenoj, per aŭtoĉaroj la kongreso veturis tra la modernaj novaj kvartaloj de la urbo, admiris la ventmuelilojn de Kinderdijk kaj la mondfamajn vitralojn en Gouda. Duontaga ekskurso al la arbarorika regiono Veluwe estis ĝuinda kaj la Delta-laboroj vekis ĉies respekton.

Ankaŭ la edifo ne forgesiĝis. Je dimanĉo okazis ekumena Diservo en unu el la belaj preĝejoj de la urbo kaj komunio por la katolikoj. Ambaŭ kompreneble en Esperanto. La internacia balo montris gajon kaj viglon.

Tra la tuta urbo kaj precipe en la ĉirkaŭo de la kongresejo, sin montris la kongresa insigno. Jam estas konate kie okazos la venontjara kongreso, nome en Fulda, Germanio. La 18-a estis sukceso ĉiurilate. La organiza komitato povas esti kontenta; ankaŭ la kongresanoj estas tiaj.

(El la radioprelego de J. Ph. Punt, vendredon la 20-an de majo, en la rubriko „Socialisma Novaĵo en Esperanto.”)

Faulhaber-fondaĵo

Danke ni ricevis mondonacojn de la ĉi sube menciitaj personoj:

k-do W. P. Siglé, Amsterdam	f 6,90
k-dino A. G. I. ten Hagen, A'dam	„ 3,—
k-dino H. E. Faber-Benker,	
Zwolle	„ 2,50
gek-doj Minholts-Balkema,	
Oosterhoogebrug	„ 5,85
k-do P. Welters, Groningen	„ 1,—
k-do C. de Jager, Groningen	„ 1,—
gek-doĵ v. Wijngaarden,	
Beverwijk	„ 10,—

Dokumentaro pri Esperanto dum la Tria Regno (1933-45)

La 15an de julio 1936, do antaŭ 30 jaroj, la nazia reĝimo likvidis ĉiujn lokajn grupojn de Germana Esperanto-Asocio kiel ankaŭ GEA mem kaj la (nazieman)NDEB. Tio estis la fino de detrua procezo, kiu komenciĝis jam en 1933 per la dissolvo de la laborista Esperanto-movado en Germanio.

La Delegitaro de Germana Esperanto-Junularo decidis kompili dokumenton pri la situacio de la germana Esperanto-movado dum la Tria Regno. Tiucele oni bezonas i.a. informojn kaj gazetraportojn pri la rilatoj inter Esperanto kaj naziismo, ordonojn pri arestado, oficialajn tekstojn de malpermesoj okupiĝi pri la Internacia Lingvo, dokumentojn pri politika rezistado de esperantistoj, sciigojn pri germanoj kaj eksterlandanoj, kiuj interrilatis per Esperanto dum la nazia periodo kaj ĉefe dum la milito kaj gazetojn, internajn cirkulerojn ktp. de GEA, NDEB kaj laboristaj E-organizaĵoj. Por kompletigi la superigardon oni bezonas ankaŭ informojn pri la situacio de Esperanto en aliaj faŝismaj aŭ okupitaj landoj.

Eĉ mallongaj informoj, kiujn vi eble konsiderus malgravaj, povus utili. Se oni deziras, diskreta pritrakto estas garantiata. Bonvolu vin turni al: S-ro Ulrich Lins, 5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanio.

Dua Suplemento

al Gvidilo tra la Esperanto-movado.

Nia konata Gvidilo de G.P. de Bruin enhavas la historion de 1887 ĝis 1936.

Post la milito aperis *Suplemento* traktanta la historion de 1936 ĝis 1948.

Ĝus aperis *Dua Suplemento*, verkita de F. Faulhaber, pri la periodo 1948 ĝis hodiaŭ. Interesa por ĉiuj esperantistoj, speciale por ekzamenaj kandidatoj.

Prezo fl. 1,50.

Libro-Servo FLE, Marnixstraat 57, Haarlem.

Poŝtĝirnumero 11 12 78, telefonnumero (02500) 6 54 17.

Cu simpatiantaj membroj necesas?

Jes, ni certe bezonas ilin, ne nur por eventuale varbi el ili aspirantojn, sed ankaŭ por plifortigi nian propagandkason, per kies enhavo ni ja povas atingi la grandan amason da homoj. En la komerca mondo oni jam tre longe uzas la reklamon kiel aĉetstimulon. Por tiu mondo ne ĉiam gravas ĉu vi bezonas iun ajn artiklon aŭ ne. Valoras nur havi en la mano rimedon por tiel efike kiel eble konvinki la aĉetonton pri la graveco de iu ajn artiklo. El ĉi tio ni povas lerni, ke ankaŭ ni esperantistoj povos atingi nian celon nur se ni agas kiel la komerca mondo. Tio signifas, ke ĉiu el ni streĉu siajn fortojn, por ke ni atingu kaj konvinku la homojn pri la neceso de Esperanto. Kaj ni havas la avantaĝon scii pri la neceso de internacia lingvo, ĉar ni jam estas esperantistoj.

Do, ĉiu sekcio faru sian eblon, vi varbu!

J. M. W. Versteeg, estrarano.

La esperanta kontaktkomitato por la sorda parto de Nord-Holando „La Norda Stebo”, organizos aŭtunan kunvenon la 18-an de septembro 1966 sur la insulo Tekselo, i.a. kun manifestacio apud la Zamenhofa monumento en Den Burg (parolado, infankantado ktp.).

Cetere, depende de la vetero, promonado tra la arbaro, kantado, deklamado kaj aliaj agrablaj programeroj.

Foriro el Den Helder je la 9.30 h., reiro al Den Helder je la 18-a. Kostoj (inkl. boaton) f. 6.—, pagotaj kun la aliĝo per la ĝirokonto 308864 de S-ino A. Tiessen-Spaans, Warmoesstraat 59, Den Burg (Texel). Aliĝoj antaŭ 1.9.1966.

Inaŭguro de Esperanto-monumento

Flanke de la Utreĥta Esperanto Komitato, UEK, ni ricevis sciigon, ke oni intencas inaŭguri la Esperanto-monumenton, sabaton la trian de septembro 1966, je la dek unua horo.

La monumento estas starigota en la Zamenhofdreef en tute nova kvartalo „Overvecht”.

Deziras korespondi:

S-ro Badygin, Valerij Nikolaevič; Matrosova 25a, kv. 68; Zaporĵije-35; USSR.

S-ro Oħrimenko, Viktor Grigoreviĉ; Do vostrebovanija; Centra Poŝtejo; Zaporĵije; USSR (li disponas pri pluraj adresoj de geesperantistoj kiuj volas korespondi)

F-ino Prigoda, Svetlana Nikolajevna; Bulvar Gvardejskij 145, kv. 18; Zaporĵije-1; USSR

Prof. Dr. Zoltan Arokszállasy; Csabai Kapu 7; Miskolc; Hungario (mezlerneja profesoro de la biologio, kemio kaj geografio, volas interŝanĝi kolorajn bildkartojn)

S-ro Boril, Josef; Prazska 9; Hradec Králové-IV; Ĉeĥoslovakio (volas korespondi kaj interŝanĝi Esp-ajojn, kolorajn bildkartojn, poŝtmarkojn, monerojn)

S-ro Egon Madsen; Näsvej 2; Assens; Danlando (volas interŝanĝi poŝtmarkojn)

S-ro Witold Starza Majewski; str. Zobkowska 27/31 Varsovio; Pollando ŝatus ricevi poŝtaĵojn, stampitaĵojn de PTT kun speciala Esperanto-stampo (ekde la Amsterdama SAT-kongreso en 1931 la Nederlanda PTT uzis 16 diversajn stampojn favore al Esperanto!)

S-ro Andreo Pach; str. Kròtka 2; Boĥnia; Pollando estas lernanto de la 5a klaso de pedagogia liceo kaj deziregas korespondadi kun nederlandanoj

S-ino Irena Marszałek; str. Kraszewskiego 9; Giuchorazy; Pollando.

S-ro L. Fiala; Fügnerova 28/18; Podebrady III; Ĉeĥoslovakio

S-ro Juozas Kazlauskas; str. Lakstingalu 12; panevežys; Litova SSR estas prezidanto de la Esperantorondo de la urba Kulturdomo kaj disponas pri 18 adresoj de esperantistoj (ankaŭ gejunuloj), kiuj volas pliperfektigi pere de korespondado.

20 gejunuloj de la Esperanto-klubo „Verda Kolombo” deziras korespondi. Adreso: Johano Moser, ul. J. Ciuski 21 Zabrze, Pollando.

Brazilano, kemiisto, 40 jara, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Interŝanĝe li sendos brazilajn aŭ alilandajn poŝtmarkojn. Adreso: S-ro Jacques Auguste Courbet — Praia do Flamengo, 254 — Apt. 404 — Flamengo, ZC-01 — Rio de Janeiro, GB. — Brazilo — Sudameriko.

